WIKIPEDIA

Slovena lingvo

La **slovena lingvo** (slovene: *slovenski jezik* aŭ *slovenščina*) estas slava lingvo de la hindeŭropa lingvaro. Ĝi havas ĉirkaŭ du milionojn da parolantoj, ĉefe en Slovenio, sed ankaŭ en Aŭstrio kaj en Italio (regiono de Triesto).[1] Ĝi estas la oficiala lingvo de Slovenio kaj unu el la oficialaj lingvoj de la Eŭropa Unio.[1]

Slovena lingvo	
Slovenščina	
Parolata en	Slovenio, Karintio (Aŭstrio), Kroatio, Italio, Hungario
Parolantoj	2 400 000
Denaskaj parolantoj	2,4 milionoj
Fremdlingvo / dua lingvo por	?
Skribo	latina kun kelkaj aldonoj
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropa lingvaro	
Slava lingvaro	
Suda slava lingvaro	
Slovena lingvo	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Slovenio, Eŭropa Unio
Reguligita de	Slovena Akademio de Sciencoj kaj Artoj
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	sl
ISO 639-2	
Bibliografia	slv
Terminologia	?
ISO 639-3	slv
SIL	slv
Glottolog	slov1268
Angla nomo	Slovene
Franca nomo	slovène
Vikipedio	

Enhavo

Alfabeto
Historio
Bildaro
Vidu ankaŭ
Notoj

Alfabeto

La slovena uzas la latinan alfabeton kun tri diakritaj literoj nomataj *šumniki* (**č**, **š** kaj **ž**). Ĝi konservas kelkajn trajtojn de la malnova slava lingvo kaj ĝin influis la latina, la germana kaj la itala.

Jen la literoj de la slovena alfabeto:

A, B, C, Č, D, E, F, G, H, I, J, K, L, M, N, O, P, R, S, Š, T, U, V, Z, Ž.

En la vikipedio, la literoj Č, Š kaj Ž estas kodita tiel:

- Č: Č (majuskla), č (minuskla) - **č** prononcata kiel *ĉ*
- Š: Š (majuskla), š (minuskla) - **š** prononcata kiel *ŝ*
- Ž: Ž (majuskla), ž (minuskla) - **ž** prononcata kiel *ĵ*

Historio

Specimeno

Očenaš (Patro nia)

Oče naš,
ki si v nebesih,
posvečeno bodi tvoje ime,
pridi k nam tvoje kraljestvo,
zgodi se tvoja volja,

La unua dokumento en la lingvo estas la Manuskriptoj de Freising, verkitaj inter la jaroj 972 kaj 1039, kiuj entute estas la unua latin-alfabeta kontinua teksto en slava lingvo.

kakor v nebesih, tako na zemlji.
daj nam danes naš vsakdanji kruh
in odpusti nam naše dolge,
kakor tudi mi odpuščamo svojim dolžnikom,
in ne vpelji nas v skušnjavo,
temveč reši nas hudega.
Amen.

En 1584, Adam Bohorič verkis sian plej elstaran verkon, nome *Arcticae horulae succisivae* (Liberaj vintraj horoj).[2] La libro, verkita en Latino, estis la unua gramatiko de slovena kaj la unua slovena normiga gvidilo. Ĝi estis adaptita kaj republikigita kiel *Grammatica latino-germanico-slavonica* en 1715 fare de Janez Adam Geiger. En tiu verko, Bohorič kodigis la unuan slovenan alfabeton, nune nomata Bohorič-a alfabeto. Ĝi estis uzata ĝis la 1840-aj jaroj, kiam ĝi estis anstataŭata de la Gaj-a latina alfabeto.

Bildaro



tabelo pri la vokaloj de la slovena

alfabeto de la slovena

mapo de Slovenio

Vidu ankaŭ

- Lingvo
- Lingvistiko
- Listo de lingvoj
- Lingva familio

Notoj

1. ↑ 1,0 1,1 informoj pri la slovena en la retejo "lingvopedio" ((http://lingvo.info/eo/lingvopedia/slovene)esperante)
2. ↑ "Zimske urice proste - Adam Bohorič, Jože Toporišič - Google Knjige". (https://books.google.es/books?id=3p9iAAAAMAAJ&q=adam+bohori%C4%8D&dq=adam+bohori%C4%8D&hl=sl&ei=ZWr8TaeoBJGPswab-_TyDQ&sa=X&oi=book_result&ct=result&redir_esc=y) Books.google.com. 2008-04-30. Alirita la 24an de aprilo 2020.

Sudslavaj	okcidentaj sudslavaj lingvoj (kroata lingvo • bosna lingvo • montenegra lingvo • slovena lingvo • serba lingvo • serbokroata lingvo) • orientaj sudslavaj lingvoj (makedona lingvo • bulgara lingvo • malnovslava lingvo) ...	
Orientslavaj	belorusa lingvo • ukraina lingvo • rutena lingvo† • rusina lingvo • rusa lingvo • Malnova Novgoroda dialekto†	

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Slovena_lingvo&oldid=6946072"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 19:07, 24 apr. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.